

Ludwig Uhland,  
La kapelo

*tradukita de Hans-  
Georg Kaiser*

Supre tronas sur la  
monto  
La kapelo en kviet'.  
En la valherbej' ĉe l'  
fonto  
Ĝoje kantas  
paŝtknabet'.

Kun funebra sonorilo  
Ektimigas mortkan-  
tad'.  
Finas tuj la ĝojjubilo  
De la knabo ĉe l'  
konstat'.

La ĝojintoj post la  
morto  
Supren en la tombojn  
venos  
Paŝtoknabo, laŭ la  
sorto,  
jen ja Morto vin eĉ  
prenos.

...

Ludwig Uhland,  
La kapelo

*tradukita de Ludwig  
Lazarus Zamenhof*

Supre staras sur la  
monto  
La silenta kapeleto,  
En la valo, ĉe la fonto  
Ĝoje kantas  
paŝtisteto.

Sonorado, mortkanta-  
do  
Nun eksonas tra l' si-  
lento, -  
Haltas knabo en kan-  
tado  
Kaj aŭskultas kun  
atento.

En la tombojn de l'  
monteto  
El la valo ĉiu venos.  
Ankaŭ vin, ho  
paŝtisteto,  
Oni iam tien prenos.

...

Ludwig Uhland,  
Die Kapelle

*tradukita de Hans-  
Georg Kaiser*

Droben stehet die Kapelle,  
Schauet still ins Tal hinab.  
Drunten singt bei Wies'  
und Quelle  
Froh und hell der Hirten-  
knab'.

Traurig tönt des Glocklein  
nider,  
Schauerlich der Leichen-  
chor;  
Stille sind die frohen Lie-  
der,  
Und der Knabe lauscht  
empor.

Droben bringt man sie zu  
Grabe,  
Die sich freuten in dem  
Tal:  
Hirtenknabe, Hirtenknabe!  
Dir auch singt man dort  
einmal.

...

Ludwig Uhland,  
La kapelo

*tradukita de Man-  
fred Retzlaff*

Supre staras la ka-  
pelo  
Sur la pinto de la  
mont',  
La paŝtist' en suna  
helo  
Ĝoje kantas ĉe la  
font'.

Triste la sonorileto  
De funebro sonas de  
La altaĵ' tra la kvie-  
to,  
La paŝtist' jam kan-  
tas ne.

Ĝin ne povas aŭdi  
soni  
La gajuloj post viv-  
fin'.  
Ho, paŝtisto, iam  
oni  
Portos supren an-  
kaŭ vin.

...

Traduko de la Germana poemo "Die Kapelle" de LUDWIG UHLAND (\*1787.04.26 - †1862-13-11) en Esperanton de HANS-GEORG KAISER (Cezar, \*1954-05-21).

Arg-639-1290 (2012-11-02 09:10:10)

Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en <http://www.cezarpoemtradukoj.cezarpoezio.de/213.html>.

Traduko de la Germana poemo "Die Kapelle" de LUDWIG UHLAND (\*1787.04.26 - †1862-13-11) en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazaro Zamenhofo, \*1859-12-15 - †1917-04-14).

Arg-639-1288 (2012-11-02 16:27:28)

Tiu ĉi poem-traduko troviĝas ankaŭ en [www.literaturo.dk/kapelo.htm](http://www.literaturo.dk/kapelo.htm), ene de la listo <http://www.literaturo.dk/enhavo.htm>.

Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas LUDWIG UHLAND (\*1787.04.26 - †1862-13-11).

Arg-639-1286 (2012-11-02 16:53:38)

Vidu:[http://meister.igl.uni-freiburg.de/gedichte/uhl\\_103.html](http://meister.igl.uni-freiburg.de/gedichte/uhl_103.html).  
Pri la poeto vidu la vikipediejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Ludwig\\_Uhland](http://de.wikipedia.org/wiki/Ludwig_Uhland). La poemo estas kantebla laŭ melodio verkita de Conradin Kreutzer. La melodio estas aŭdebla tie: <http://www.musicanet.org/robokopp/Lieder/drobenst.html>.

Traduko de la Germana poemo "Die Kapelle" de LUDWIG UHLAND (\*1787.04.26 - †1862-13-11) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04).

Arg-639-1287 (2012-11-02 08:49:45)

Pri la aŭtoro vidu ankaŭ la vikipedian retejon [http://en.wikipedia.org/wiki/Ludwig\\_Uhland](http://en.wikipedia.org/wiki/Ludwig_Uhland).